


# La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe la Universitato de Viktorio

vendredon, la 4-an de Julio, 2014 • numero kvin

## Kio okazos hodiaŭ?

★ 9 atm –  
12:30 ptm:  
Kursoj



★ 12:35 ptm:  
Student Union, Upper Lounge  
Grupfoto

★ 3:00 – 4:00 ptm  
Student Union, Upper Lounge  
Prezento pri voĉaktorado en  
Esperanto, kaj la filmoj de  
Christopher MIHM (Ĵenja)

★ 7:00 ptm – 8:00 ptm  
Student Union, Upper Lounge  
Latino kaj Esperanto kiel  
internaciaj lingvoj (Francisko)



## Anonco

Abengo (en ĉambro #116) havas kelkajn ekzemplerojn de la gazeto *Formoza Folio* por donaci.

Se vi ŝatas scii pri la Esperanta movado en Tajvano, bonvolu kontakti lin por ricevi tajvanan Esperanto-gazeton senpage.

### La NASKa Fasko

Redaktejo: Ĉambro 203  
<nask.esperanto@gmail.com>

La NASKa Fasko estas ĉiutaga ĵurnalo de la kursaro.

Se vi volas kontribui mallongan artikolon, foton, ŝercon, bildstiron, leteron, poemon, am-leteron, ktp. bonvolu alporti ĝin al la redaktejo en ĉambro 203, aŭ – eĉ pli bone – sendu ĝin al <nask.esperanto@gmail.com>.

## Ĉu Latino fariĝu monda interlingvo?

de Francisko LORRAIN

Mi hezitas malkaŝi tion al vi, sed mia respondo al tiu demando estos bedaŭrinde nea, en la prezentaĵo, kiun mi faros hodiaŭ vespere! En ĝi mi prezentos Latinon kiel internacian lingvon, sed komparante ĝin iam kaj tiam kun Esperanto. Jen resumo de la enhavo.

De Antikveco, Latino neniam ĉesis esti parolata, legata, skribata. Mi prezentos plurajn ekzemplojn de tio, ĝis nia jarcento.

La prononco de Latino relative simplas, sed multe variis ne nur dum la tempo, sed ankaŭ de lando al lando. Pro sia gramatiko, samtempe pli kaj malpli komplika ol tiu, ekzemple, de la latinida franca, sed tre malsama, Latino havas la reputacion esti malfacila lingvo. Sed ĝia vera malfacileco radikas en alio: en ĝia riĉega vortostoko, kiu grandparte lasis neniun spuron en la nuntempaj latinidaj

lingvoj, dum tiuj latinaj vortoj, kiuj transdaŭris en ĉi-lastaj, alprenis sencojn ofte malsamajn ol tiuj, kiujn ili havis en la klasika Latino.

De jarcento al jarcento, ekde la enkonduko de presado en Eŭropo, la rolo de Latino kiel internacia lingvo iom post iom velkis. Ĝi nun konservas oficialan statuson en Vatikano kaj ene de la katolika eklezio, sed fakte eĉ tie oni preskaŭ ne plu uzas ĝin. Latino tamen daŭre vivas en la nuntempo, sed malgrandskale, ene de diasporo de pasiaj latinistoj.


Pluraj homoj proponis simpligitajn formojn de Latino, sed neniu el tiuj planlingvoj sukcesis kiel internacia lingvo. Esperanto, kaj relative simpla kaj tre esprimiva, grandparte (rekte aŭ malrekte) derivita el Latino, estas hodiaŭ multe pli parolata ol ĉi-lastaj. Ĉu Esperanto estas la Latino de la estonteco?

## Voĉaktorado en Esperantujo

Hodiaŭ Ĵenja prezentos al ni programeron pri voĉaktorado, pri kiel Esperantujo bezonas voĉaktorojn, kaj kiel oni povas senkoste voĉaktori per tek-komputilo.

Ŝi portis kun si DVD-ekzemplerojn de kelkaj filmoj de Christopher MIHM, kiuj estas duobligitaj en Esperanton, kaj kiuj aĉeteblas kontraŭ po \$10. Parto de tiu sumo iras al la reĝisoro, kaj li bonkore donacas parton al Kino-Teatro-Festivalo subtene.

La filmoj de Mihm estas samtempe novaj kaj malnovaj, bonaj kaj malbonaj, ridigaj kaj timigaj. Oni faris ilin lastatempe, sed ili havas etoson de la kvindekaj jaroj, estas malaltbuĝejaj, kaj entute ne traktas sin serioze.



# Pri la poezio de Emily DICKINSON en Esperanto

de Liĉjo MILLER

Ekzistas en Esperanto malgranda kolekto de tradukoj el la poemoj de Emily DICKINSON, *Vulkane* (private eldonita de Kris LONG en 1979). En la volumeto, kvin poemojn tradukis William AULD, la aliajn Long. Krom tiu ĉi kolekto mi ne konscias

pri aliaj eldonitaj tradukoj de Dickinson-poemoj.

Laŭ mia taksado, la du britoj ne tute bone sukcesis. Ili ĝenerale mistrafis la ritmon kaj rimadon de la originalaj tekstoj, kaj ofte malaperis la sento de “strangeo” kiun oni vidas/sentas en la poemoj de Dickinson. Estas eble ke ili tradukis surbaze de unu el la fruaj “redaktitaj” eldonoj

de la poemoj, ĉar en tiuj ĝenerale oni ne vidas la neortodoksajn interpunkciadon kaj majuskligon kiuj estas ĉefaj Dickinson-trajtoj.

Jen unu ekzemplo, konata poemo, *There's a certain slant of light*. Mi montras la originalan anglan tekston, la tradukon el *Vulkane*, kaj mian propran tradukon:

## Emily DICKINSON, n-ro 320

There's a certain Slant of light,  
Winter Afternoons –  
That oppresses, like the Heft  
Of Cathedral Tunes –

Heavenly Hurt, it gives us –  
We can find no scar,  
But internal difference –  
Where the Meanings, are –

None may teach it – Any –  
'Tis the seal Despair –  
An imperial affliction  
Sent us of the Air –

When it comes, the Landscape listens –  
Shadows – hold their breath –  
When it goes, 'tis like the Distance  
On the look of Death –

## el *Vulkane*

Difinita lumoklino  
vintrajn posttagmezojn –  
premas, kiel katedralaj  
melodioj pezas –

ĝi ĉiele vundas –  
ni ne trovas sangon,  
sed internan diferencon,  
kie la signifoj –

instruebla de neniu –  
stampas malespero –  
imperion de aflikto  
sendas la aero –

tien – dum pejzaĝ' aŭskultas –  
ombroj – ne plu spiras –  
reen – kvazaŭ per distanco  
formienus morto –

## traduko de Lee MILLER

Vintre posttagmeze,  
Frapas luma Fal' –  
Prem-opresas, Peze  
Kiel Ĉant' en katedral' –

Nin Ĉielo Tuŝas –  
Dolor' sen ia spur,  
La Signifo kuŝas  
Profunde en la kor' –

Ĝin instrui – ne, senpova –  
Sigelita: “Malesper'” –  
El Nenio venas nova  
Pasiono de mizer' –

Falas lum', Pejzaĝ' silentas –  
Eĉ la ombroj – spiras ne –  
Mallumig'as, kaj mi sentas  
Ke la Mort' rigardas re –

Se vi komparas la du tradukojn, vi vidas ke la tradukinto en *Vulkane* ĉefe sekvis la vortordon kaj konceptojn de la originala angla. Mi, male, kelkfoje ŝanĝis la ordon de la konceptoj, kelkfoje ŝanĝis la konceptojn mem, kaj foje iom flankeniris de la senco

de la originala verko. Cetere, mi atentis la dividostrekojn kaj majuskligon de ŝajne hazardaj vortoj. Mi ne dirus ke mia traduko estas brile bona, sed nur montras ĝin por ke vi komparu malsamajn alirojn al la sama tasko. Se mi rezignis pri la preci-

zaj ideoj de Dickinson en kelkaj lokoj, ĉu mi pli bone kaptis la “efikon” de la poemo? Aŭ ĉu mi perdis ion tro gravan per tiaj decidoj?

## Gvidsigno en Viktorio

de Lottie ERICSON

La grandega hotelo *Empress* (“imperiistino”) estas konstruita en 1911 apud belega haveno. Oni povas eniri por vidi antikvan anglan arĥitekturon kun skulptita ligno en muroj kaj plafonoj. Sed antaŭ kelkaj jaroj, nova parto estis aldonita kaj la majesta konstruaĵo nun havas konferencan centron ornamitan per indiĝenaj objektoj. Oni povas ankaŭ butikumi ene kaj mendi propran teon kun keksoj (“*high tea*”).



Vikimedia